



Muzeo „videbla” ankaŭ por blinduloj



**Ĉu militoj savos
Usonon?**



Angla festivalo - en Kimrio

www.retbutiko.net

Vagu laŭplaĉe inter la verkoj de la Retbutiko.



Kategorio
elektu la
specon kiun
vi deziras

Kvanto
skribu tie ĉi la
kvanton, se vi
deziras mendi

Bildo
kun fotoj de la plej
gravaj verkoj




Detaloj
pliaj detaloj
kiel eldonjaro,
paĝnombro,
priskribo, ktp.

Recenzo
legu recenzon
pri la verko

www.retbutiko.net

1996-2006
La retbutiko
10 jara!



Angla festivalo - en Kimrio

14



La urbeto Hay-on-Wye, situanta ĉe la pitoreska limo inter Kimrio kaj Anglio, kun loĝantaro de nur iom pli ol 1800 homoj, posedas 41 libro-vendejojn. Kaj tie, ĉiujare okazas dusemajna kultura festivalo, kiu altiras eminentajn verkistojn, precipe el la angleparolanta mondo, ankaŭ ĵurnalistojn, klerulojn kaj fojfoje politikistojn.

Muzeo „videbla” ankaŭ por blinduloj

20

En la muzeo Omero en Ankono (Italio), oni trovas centon el la plej elstaraj ĉefverkoj de la egipta civilizacio ĝis la novklasika stilo en la dek-naŭa jarcento. Kompreneble temas ne pri originaloj, sed pri perfektaj muldkopioj gipsaj aŭ vitrorezinaj, preskaŭ ĉiuj reproduktitaj laŭ la originalaj dimensioj. La rigardantoj povas aprezi kaj admiri ĉiujn nuancojn, kiujn la sentsugestado de tiuj mirigaj formoj kapablas vivigi.



La fino de malmultekosta ekonomio

22

La daŭra kreskado de naftoprezoj konsciigas homojn, aparte okcidentanojn, ke tiu ĉi krudmaterialo estas altvalora kaj samtempe rara krudmaterialo. Ĉu jen la fino de la ekonomio bazita sur nafto?



Ĉu la militoj savos Usonon?

24

En la usona ekonomio de la lastaj 65 jaroj rimarkindas unu konstanto: la forta kunligo inter militaj invadoj kaj kresko de la landa ekonomio. Laŭ donitaĵoj de la ŝtata oficejo pri ekonomiaj esploroj, kreskoj de la ekonomio okazis dum preparado de militoj, dum militoj kaj dum la postmilita rekonstruo. La usona gazeto Wall Street Journal skribis en februaro 2003, ke dum la preparo de la atako de Irako la militaj elspezoj reprezentis la unusolan favoran flankon de la „malforta usona ekonomio”.

POLITIKO

| | |
|------------------------|----|
| Opinio | 10 |
| Faktoj kaj famoj | |
| Albanio | 11 |
| Ĉu akcidento aŭ murdo? | |

MODERNA VIVO

| | |
|-----------------------------|----|
| Modo | 12 |
| La stilo estas la homo | |
| Opinio | 12 |
| Pensante pensie... | |
| Malarmado | 13 |
| Pedale pacen | |
| Instruado | 13 |
| Fajra afero | |
| Britio | 14 |
| Angla festivalo - en Kimrio | |

EKONOMIO

| | |
|--|----|
| Litovio | 16 |
| Litovio sen eŭro | |
| Ĉinio | 17 |
| Ekonomio ege kreskas, sed lando restas malriĉa | |
| Albanio | 17 |
| Sendrata telefonado regata de monopolistoj | |

LIBROJ

| | |
|---|----|
| Vortaro ne nur utila sed ankaŭ bela | 18 |
| Literatura litanio | 19 |

ARTO

| | |
|------------------------------------|----|
| Muzeo por tuŝi | 20 |
| Arto „videbla” ankaŭ por blinduloj | |

MEDIO

| | |
|----------------------------------|----|
| Francio | 22 |
| La fino de malmultekosta energio | |

ESEO

| | |
|--------------------------|----|
| Ekonomio | 24 |
| Ĉu militoj savos Usonon? | |

| | |
|------------------------|----|
| Abonoj | 4 |
| Enkonduko | 5 |
| Leteroj | 6 |
| El mia vidpunkto | 9 |
| Anoncetoj | 27 |

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodatan fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmando nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko traktata je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

| Ŝtato de la paganto | | MONATO | | La Jaro aere | |
|---------------------|-----|---------|------|----------------|------|
| | | surface | aere | 1 fojon monate | tuj |
| Argentino | EUR | 23 | 25 | 5 | 10 |
| Aŭstralio | AUD | 82 | 90 | 9 | 17 |
| Aŭstrio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Belgio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Brazilo | EUR | 23 | 25 | 5 | 10 |
| Britio | GBP | 32 | 35 | 4 | 6,5 |
| Bulgario | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Ĉeĥio | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Danio | DKK | 345 | 375 | 40 | 70 |
| Estonio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Finnlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Francio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Germanio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Germanio orienta | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Grekio | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Hispanio | EUR | 41 | 45 | 5 | 9 |
| Honkongo | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Hungario | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Irlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Islando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Israelo | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Italio | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Japanio | JPY | 6600 | 6900 | 860 | 1220 |
| Kanado | CAD | 73 | 78 | 9 | 15 |
| Kipro | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Koreio | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Kroatio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Latvio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Litovio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Luksemburgo | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Malto | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Nederlando | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Norvegio | NOK | 370 | 430 | 45 | 71 |
| Nov-Zelando | NZD | 93 | 99 | 9 | 18 |
| Pollando | PLZ | 99 | 110 | 22 | 36 |
| Portugalio | EUR | 36 | 41 | 5 | 9 |
| Rusio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Singapuro | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Slovakio | EUR | 23 | 25 | 5 | 9 |
| Slovenio | EUR | 30 | 34 | 5 | 9 |
| Sud-Afriko | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Svedio | SEK | 430 | 465 | 49 | 84 |
| Svislando | CHF | 71 | 82 | 9 | 14 |
| Tajvano | EUR | 41 | 42 | 5 | 10 |
| Usono | USD | 61 | 63 | 8 | 13 |
| Bazo eŭropa | EUR | 46 | 50 | 5 | 9 |
| Bazo ekster-eŭropa | EUR | 48 | 50 | 5 | 10 |

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopiiilo +32 32 33 54 33.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: esperfed@ans.com.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belgo:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilo:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Kilncadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variabi. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estono:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finnio:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Francio:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:** Hilde Maul, Pferserer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
- **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
- **Hans Dieter Platz,** Postfach 1148, D-34303 Nidenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- **Wolfgang Schwanzer,** Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irano:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japanaj:** KLEGG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. Reto: kleg@mvf.biglobe.ne.jp.
- **Japano:** Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskat@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Koreo:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperant@unitel.co.kr
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- **Kroatio:** Kroata Esperantista Unuigo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. Reto: mbeLOSEV@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litovo:** Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-10009 Vilnius-40, Litovio. Reto: laimius@fastlink.lt.
- **Luksemburgo:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvego:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelando:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:** Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
- **Mikaelo Ĉertilov,** Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:** Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartskövägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: person.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
- **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 04-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usono:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org
- **Venezuela:** Peter Jaimez, Apartado 3482, Caracas 1010A. Reto: peterjaimez@tutopia.com.



Leteroj

Leteroj de legantoj kutime estas spicaĵo en gazeto, ĉar – kontraste al aŭtoroj – legantoj verkante tekstojn ne devas tiom atenti regulojn de objektiveco. Ili povas eldiri sian tute personan opinion, kritikon, eĉ mokon. Kompreneble ankaŭ por tiuj tekstoj validas la ĵurnalisma principo, ke oni ne rajtas kalumnii nek ofendi aliajn personojn kaj instituciojn, sed legantoj rajtas polemiki, kion aŭtoroj kaj redaktantoj povas nur en komentarioj, kaj eĉ tion nur modere. Tia libereco tamen jen kaj jen povas forlogi iujn al duonveroj aŭ eĉ mensogoj, kaj se ili volas esti aparte ruzaj, ili kaŝas sian nomon per pseŭdonimo, tiel ke neniu povas scii, kiu fiulo vere skribis la koncernan leteron.

Bonŝance tio ne okazas ofte ĉe nia revuo, sed kiam antaŭ kelka tempo alvenis letero, pri kiu ni dubis, kaj ne povis konstati, kiu vere estas la aŭtoro, ni pridiskutis en la redakta teamo la problemon. Rezulte ni enkondukis pli striktajn regulojn por leteroj, tiel ke nun anonimaj aŭ falsaj leteroj absolute ne havas ŝancon. Honesta skribanto ja ne timu, se li indikas sian kompletan adreson inkluzive de telefon-numero, tiel ke en okazo de bezono ni povas certigi per alvoko la identecon de verkinto. Eble estas ja nur koincido, sed frapas, ke post la unua aperigo de la novaj reguloj en numero 8-9 alvenis multe pli da leteroj ol kutime (vidu kiom ampleksa ĉi-foje estas la rubriko). Kiel ajn, daŭre validas, ke ni ĝojas pri ĉiu letero, ĉar ĝi montras, ke ni trafis la intereson de niaj legantoj, kiuj reagas al tekstoj aperintaj. Krome leteroj estas bona rimedo por korekti eventualajn erarojn aŭ misprezentojn de aŭtoroj, kiuj ja ankaŭ estas nur homoj eraripovaj. Cetere, por tiuj, kiuj havas ret-aliron, nun estas aparte facile sendi leteron al *leteroj@monato.net* (kaj ankaŭ pli facile por ni, ĉar ni ne devas komposti la tekstojn). Do daŭre validas mia alvoko: skribu leterojn! Kaj ne hezitu ne nur laŭdi, sed ankaŭ kritiki (aŭ eĉ insulti) nin ...

Sincere via

Stefan MAUL

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 27a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alós i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Matil Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Librecojn oni ne sendu al la redaktoro proprainicite. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** Maritza Gutierrez Gonzalez, Avellaneda 212, e. Gertrudis y Josefina, 10500 Habana, Kubo. Rete: medio@monato.net.
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Dio kaj diablo

En komento pri la afero Abdul Rahman en Afganio (MONATO 2006/5, p. 7), Stefan Maul ĝeneraligas ke, kontraŭe al islamo, judismo kaj kristanismo evoluis al pacamaj organizaĵoj. Pri la novelektita registaro de Palestino, li diras ke ĝi konsistas el anoj de terorisma partio, sed pri la „muro de la honto” li diras nenion.

Oni povas diskuti, ĉu la israela politiko rezultas el religia fanatikismo, el rasismo, aŭ el memsubtenanta terorisma sistemo, sed fakto estas, ke la ĉiopova Dio ne povas instigi homojn al milito. Ĉiopova Dio ne bezonas helpon de siaj fideluloj. Religiaj militoj rezultas el komuna agado de Dio kaj Diablo, kiuj kune devigas la homojn elekti inter du flankoj. La dio de Israelo estas la diablo de ĉiuj aliaj popoloj en la regiono.

Martin DECALUWÉ
Belgio

Stela revo

Mi pensas, ke la intenco krei monunuon, kiu estas ŝirmita de inflacio (MONATO 2005/5, p. 23-25), montriĝis esti nur revo. Ĝi ja estis ligita al guldeno, kiu evidente ne havis konstantan valoron. Fakte, probable pro la perdo de aĉetpovo de guldeno, oni ŝanĝis la valoron de la stelo al duono de guldeno.

Tamen, oni povus denove stampi „stelojn”, sed nur por plezuro de numismatoj. Surbaze de la lasta valoro de la stelo (duono de guldeno) oni povas kalkuli ĝian valoron en eŭroj laŭ la ekvacio fiksita por guldeno, kiam eŭro naskiĝis: 1 eŭro egalas al 2,20371 guldenoj, sekve unu stelo egalus nun al 0,22689 eŭroj.

Carlo MASELLA
Italio

Unu viro valoras du virinojn

Mi estas kristandevena, mia edzino islamdevena. Ni ambaŭ nek praktikas izolan religion nek kontraŭbatalas religian konvinkon de aliaj. Mi forte interesiĝas pri aliaj, „fremdaj” religioj kiel judismo, hinduismo aŭ budhismo, kaj provas esti(ĝi) vera kosmopolito tolerema, senacieca kaj senrasisma.

Supozeble mi povus amike rilati kaj diskutadi kun Hussain Al-Amily (MONATO 4/2006, p. 6) kaj certe konsenti en multaj vidpunktoj. Sed mi ne sukcesas senhezite konsenti kun lia aserto, ke „ne estas vere, ke la araba virino suferas pro ‘premo de Korano’”. La Korano mem distingas virojn kaj virinojn per malsamaj rajtoj:

„Rajtoj estas reciprokaj kaj similaj laŭ justeco, tamen la viroj havas ian privilegion.” (2:229)

„... Vi voku du el viaj viroj kiel atestantojn, kaj se du viroj ne estas haveblaj, tiam voku unu viron kaj du virinojn.” (2:283)

„... vira ricevu la samon kiel du virinaj” (idoj) (4:12) kaj same pri heredaĵo: „... ricevu ĉiu vira la parton de du virinaj” (4:177)

Mi citis el *La Nobla Korano* en la Esperanto-traduko de Italo Chiussi, sed la samon konfirmas mia germana traduko kaj mia Korano en turka traduko.

La Korano en alia loko postulas egalrajtecon inter viroj kaj virinoj, nome en suro 33:36, sed la ĉiutaga vivo en islamaj familioj montras senrajtecon kaj subpremon de virinoj.

Mi konsentas, ke Okcidento ne rajtas subpremi la araban kaj islamajn kulturojn kun ilia propra speco de demokratio. Sed mi pridubas, ke ĉiu sistemo sin nomanta demokratia kaj libereca fakte estas tia.

JOMO IPFELKOFER
Germanio

Erara lingvouzo

En la ege interesa letero *Pacigunto* (MONATO 2006/1, p. 6) de Hektor Alos i Font el Katalunio, la aŭtoro uzis la vorton „represaliitoj” kun signifo, kiun tiu ĉi vorto ne havas. La kapvorto „represalio” en *PIV2* estas eksplikita jene: „Perforta agado, jure malpermesita, per kiu armeo aŭ armita grupo respondas al malamika agado: ~e forbruligis vilaĝon.” En *PIV1* ĝi estas eksplikita pli-malpli samsignife: „Ago, en si mem jure malpermesita, per kiu unu ŝtato respondas al kontraŭjura ago de alia ŝtato: ~e forbruligis vilaĝon.” Do temas pri venĝo de unu ŝtato al alia.

La termino „represalio” do apartenas al la fako de la internacia publika juro,

Abonhelpa Fonduso

En 2006 la legantoj de MONATO donacis 51 senpagajn abonojn al legemuloj en landoj kun malforta ekonomio, nome en Armenio, Benino, Burundo, Ĉilio, Ĉinio, Ganao, Irano, Kongo (D.R.), Kongo (okc.), Kubo, Madagaskaro, Nepalo, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Pakistano, Panamo, Rumanio, Serbio, Taĝikio, Tajlando, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Ugando, Urugvajo, Uzbekio kaj Vjetnamio. Sed restas ankoraŭ aliaj, kiuj dezirus legi MONATON sed ne kapablas pagi. Helpu al ili kaj subtenu la Abonhelpan Fonduson!

Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio “Abonhelpa Fonduso de MONATO”.

Se vi pagas la egalvaloron de unu abono aŭ pli, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon, kiun vi donacis, kaj eble ekkorespondi kun “via” leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevontoj tre sinceran dankon!

sed en la nuna kunteksto temas pri ago de ŝtato kontraŭ siaj civitanoj. En tiu ĉi kazo la vorto „reprezalio” estas uzata kiel politika termino. La aŭtoro eble havis antaŭvide la hispanan vorton „*represalia*”, kiu similas al „reprezalio”, sed signifas pun(sub)premon. En la *Hispana-Esperanta Poŝvortaro Lexicón Sopena*, Barcelono, 1988, la vorto „*represalia*” estas tradukita per „revenĝo” kaj en la direkto esperanta-hispana „reprezalio” estas prezentita kiel ekvivalento de „venĝo”.

Bedaŭrinde, ankaŭ alilingvaj esperantistoj diverskiale erare uzas la vorton „reprezalio”.

Dimitar HAĜIEV
Bulgario

Lingvoj formortu senprobleme

En MONATO 2006/6, p. 6, Filippo Franceschi atentigas pri baldaŭa lingva katastrofo: la estingiĝo ene de tiu ĉi jarcento de la plimulto de la ĉirkaŭ 6800 nun parolataj lingvoj pro la superrego de la usonangla. Tiu estingiĝo kaŭzos malriĉiĝon ne nur antropologian, sed ankaŭ filozofian, logikan, etikan, historian.

Laŭ mi lingvoj plenumas almenaŭ tri funkciojn, ĉar ili samtempe estas: a) amaskomunikiloj, b) deponejoj de kulturo (bibliotekoj de originalaj aŭ tradukitaj verkoj), c) identigiloj de la koncerna lando.

En MONATO 2005/7-8, p. 28-29, Paŭlo Peeraerts raportis, ke ĉi-monde estas 6912 vivantaj lingvoj, el kiuj nur 8 havas pli ol 100 milionojn da denaskaj parolantoj, dum 204 lingvoj havas malpli ol dek parolantojn. Laŭ la supre menciitaj kriterioj, almenaŭ tiuj 204 lingvoj valoras neniom. Tamen de multaj jarcentoj la lingvoj latina kaj helena ne plu estas vivantaj, sed ili *pluvivas*, ĉar iliaj kulturaj akiraĵoj (alireblaj en fakaj bibliotekoj) fundamentas nian hodiaŭan okcidentan civilizon. La lingvoj en vivdanĝero hastu restigi skriban ateston pri siaj kulturaj akiraĵoj, kaj, tion farinte, ili povos senprobleme formorti kaj malaperi.

Elvia BELLUCO
Italio

La granda eŭrop-usona familio

En MONATO 2006/6, paĝo 9, mi legis en *Eksterlande eminentaj* la sekvan frazon: „post 1990, kiam Albanio reaniĝis al la granda eŭrop-usona familio”.

Strange. Unue, ankoraŭ nenie mi ĝuis aŭdi pri „la granda eŭrop-usona familio”. Due, ĉu Albanio reaniĝis nur al tiu familio? Ĉu nia mondo kaj planedo ne estas unu familio? Ĉu la mondo-partoj latina-merika, afrika, azia, aŭstralia estas malpli allogaj?

Sergei PAĤOMOV
Rusio

Konciza, klara kaj inteligenta

Laŭdon specialan pro la artikolo de Zlatko Tišljar *Lingvo-politiko: Mankas unueco en la Unio* (MONATO 2006/7, p. 7). Konkiza, klara kaj inteligenta. Dankon!

Albert WICKLER
Luksemburgo

Ŝpar-hoteloj

95 eŭrojn vi, akra kritikanto de la usona vivostilo, toleras pagi por unu dupersona tranokto en kaĝa ĉambro de urbega hotelo plus dufoje 10 eŭrojn por modesta matenmanĝo (MONATO 2006/7, p. 5)? Tian mondon mi ne volas, ne subtenas, kaj probable 90 procentoj de la tera homaro ja eble volus, sed ne povas. Mi mem ne plendus pri la eja malgrandeco kaj apenaŭ sufiĉa ekipaĵo, se mi trovus trankvilan, puran, pagindan (ne -endan) tranoktolokon.

Bedaŭrinde, esti simpla tranoktanta nuntempe kostas preskaŭ ĉie tro multe, almenaŭ por modesta dormanto (postulema „gasto” ja pagu!). Mirigas min, kara samgeneraciulo, kies tekstojn mi plej ofte aprobe legas en MONATO, via toleremo al tia mondo, kia ĝi fariĝis kaj kiun vi aliokaze konvinke kondamnas. Sed en tiu ĉi enkonduko vi nur plendis pri ia pagenda mizereco de ŝpar-hoteloj, sed ne pri la „sistemo”. Envere ja ne temas pri kvadratmetroj kaj prezoj, sed pri vivostilo kaj moralo.

RÖSSLER Franz-Georg
Germanio

Ŝpar-hoteloj (2)

La priskribita ĉenhotelo, kie tranoktis Stefan Maul (MONATO 2006/7, p. 5) estas tre simila al hoteloj en francaj „ĉenoj”, kie ni jam dum jaroj tranoktadas sen troa malkomforto. Sed – jen la diferenco: ni pagas malpli ol la duonon de tiu terure alta prezo! La absoluta maksimumo (en 2006) por dupersona ĉambro en la centroj de grandurboj (Berlino, Parizo) estas 50 eŭroj. Kaj ne diru, ke tio validas nur por hoteloj en Francio. La ĉeno *Accor* troviĝas tre multloke en Germanio kaj Belgio.

Helga RAPLEY
Francio

Nota de la redakcio: Ĝuste en hotelo de la ĉeno *Accor* Stefan Maul tranoktis. Sed evidente gastis en Antverpeno estas pli koste, ol en Berlino aŭ Parizo ...

Talenta kaj vera artisto

Mi gratulas plenkore al Petro Desmet⁷ pro lia recenzo pri *Pomego* (MONATO 2006/7, p. 18-20). Ĝi estas la plej bona, kiun mi legis ĝis nun. Ĉu ne jam Zamenhof diris en sia *Proverbaro*, ke serioza kaj humura recenzisto estas talenta kaj vera artisto? Se ne ... li hazarde forgesis diri.

André HERRMANN
Svislando

Turkio ne respondeca

Aldone al la artikolo *Krimo forgesita* (MONATO 2006/1, p. 13): En 2001 la franca senato akceptis leĝon, agnoskantan la genocidon de armenoj en la Otomana Imperio en 1915. La malsupra ĉambro de la franca parlamento (la ĉambro de deputitoj) akceptis analogan leĝon en majo de 1998. Tiam la evento provokis ŝtormon de indigno en Turkio. Turkaj potenculoj aplikis eĉ kelkajn limigojn de ekonomia aktiveco de francaj kompanioj en Turkio.

La saman reagon elvokis rezolucio pri agnosko de la genocido de armenoj, akceptita de la komitato pri internaciaj rilatoj de la usona senato. Finfine la usonaj leĝdonantoj decidis ne kvereli kun Turkio kaj ne akceptis la rezolucion.

Ankaŭ la francaj senatanoj dubis. La leĝo estis agnoskita nur post relative longaj debatoj, kun 164 voĉoj por kaj 40 kontraŭ. La tiama ministro pri ligoj kun la parlamento Jean-Jack Queyranne deklaris: „Francio estas amiko de Armenio kaj nuntempa Turkio, kiun oni ne konsideru respondeca pri krimoj okazintaj dum la agonio de la Otomana Imperio.”

En sia artikolo Susanna Gevorgjan menciis, ke 15 registaroj agnoskis la genocidon. Ŝi bonvolu menci ilin. Antaŭ anigi Turkion, Eŭropa Unio postulu, ke ĝi agnosku la genocidon.

Sergei PAŤOMOV
Rusio

Mussolini, Hitler, Stalin kaj Bush

Ŝajnas, ke la bando de Bush preterpasis ĉian limon. Plej ŝokas la silento, eĉ aprobo de la usona popolo. Sed nenio nova: ofte la popoloj tiel eraras kaj poste amare pagas. 1938, 90 elcentoj de la italoj subtenas Mussolini, amasmurdiston en Libio kaj Etiopio; 1944, 90 elcentoj de la germanoj subtenas Hitler, kreinton de la koncentrejoj; 1953, 90 elcentoj de la rusoj subtenas Stalin, elpensinton de la gulago ... Simile hodiaŭ en Usono: Bush, evidenta senbrida militkrimulo – multe pli ol Miloŝević kaj Sadam – subtenata en siaj imperiaj militoj fare de 61 elcentoj de la usonanoj, laŭ freŝdata opinisondo. Respublikanoj kaj demokratoj – ĉiuj pasie kune, por la Patrio (nome, por la Petrolo). „Prava aŭ malprava: mia Patrio!”

En tiaj situacioj kie estas la intelekta elito? Aŭ konsenta, aŭ masakrita-ekzilita-fuĝinta, aŭ ... silenta, absorbata de siaj fakaj esploroj? En 1937 ĵurnalisto demandis al Hans Kelsen, ĉefteoriano de la jura formalismo: „Se ŝtatestro, laŭkonstitucie elektita, iun tagon dekretus, ke estu mor-

tigitaj ĉiuj ruf-haruloj, kion vi dirus?” La juromajstro suverene elblovetis: „Mi estas juristo, ne moralisto.” Jen ŝrapnela respondo al la tuta naiva koterio: kleristoj, humanistoj, Rousseau, Kant, Beccaria ... La „silentuloj” estas liaj disĉiploj. Sed, kio pri miloj da homoj ĉiutage masakrataj? Ba, kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas.

Filippo Franceschi
Italio

Reveno al la hejmlando

Dum la teruraj bombardoj de Libano fare de la israela armeo mi ofte rememoris la priskribon de la vizito de Husejn Al-Amily al lia naskiĝ-vilaĝo At-Tajba (MONATO 2006/7, p. 8), kiu mem suferis ilin kun tragikaj rezultoj laŭ gazetaraj raportoj. Liaj vortoj bildigis pejzaĝon tre similan al tiu de mia regiono, kaj lia kontribuo sentigis min eĉ pli proksima al la viktimoj.

Hektor ALOS I FONT
Katalunio

Insulto al Evonimo

Alia kontribuanto al MONATO jam plendis pri la emo de la redaktora teamo „plibonigi” la originalan tekston de aŭtoroj. Bedaŭrinde eraro refoje okazis, kiam aperis mia teksto pri la evonima milito (MONATO 2006/8-9, p. 31-32). En la jaroj antaŭ tiu milito mi kaj mia edzino Hortensia Kvinke ofte vizitis la Evoniman Respublikon, kaj ni povas certigi, ke ties ĝentila popolo estus profunde ŝokita, se ĝi sciis, ke iu ajn priskribis ĝian landon kiel „senregan”. Sen *reĝo* ĝi ja estas, sed tute ne *senrega*.

Kiel la samtempe fondita San-Marino, la malgranda evonima nacio fieras pri sia titolo (koincide sama kaj en la itala

lingvo, kaj en la evonima) *Serenissima Repubblica*. Tamen, ĉar la superlativa finaĵo „-issima” ne ekzistas en Esperanto, mi tradukis ĝin „serenega” (t.e. „seren-” plus „-ega”). Mi esperas, ke MONATO humile pardonpetos al la evonimanoj pri la kvazaŭa (kaj sendube senintenca) insulto al ilia lando.

Albisturo Kvinke
Irlando

Noto de la redakcio: Efektive temas pri senrega komposteraro, kaj ne pri intenca insulto al amika ŝtato. La kompostisto kapkline pardonpetas al la aŭtoro kaj al la multnombraj evonimaj abonantoj de MONATO.

Samarkando

Mi ŝatis la artikolon en la lasta MONATO (2006/8-9, p. 17-20) pri Samarkando des pli pro tio, ke jam mi turismis kun deko da samurbanoj en Uzbekio. Anatoli Ionesov estas kompetenta vojaĝisto kaj amikeca ĉiĉerono. Ĉi-septembre alia grupo flugis al la Silka Vojo. Ne bedaŭrinda vojaĝo.

Gaston RISTE
Francio

Samarkando (2)

Kun granda emocio kaj plezuro mi tralegis la artikolon pri Samarkando. La verko de Anatoli Ionesov ne nur memorigas min pri la belega vojaĝo kaj restado en Samarkando, sed donis al mi la perspektivon pri la historio de la urbo. Kiam mi organizis karavanon kun 22 japanoj, Ionesov gastame kaj afable kondukis nin al la moskeoj kaj medreseoj, pri kiuj li detale skribis en la artikolo.

YAZAKI Yoko
Japanio

Samarkando (3)

Grandan dankon pro la publikigo en MONATO de la rimarkinda artikolo de Anatoli Ionesov pri Samarkando. La artikolo tre inspirplene rakontas pri ĉiuj tutmonde konataj belegaj monumentoj de Samarkando. Tre pitoreskaj estas la fotoj.

Vladimir LEMELEV
Rusio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Informadika revolucio

de Zlatko TIŠLJAR

Siatempe la industria revolucio kaŭzis totalan ŝanĝon de la socia funkciado de la homaro. Ĝi ŝanĝis la feŭdan socian sistemon, kiu funkciis baze de heredaj leĝoj, ĝi ŝanĝis la filozofion, en kiu la socia hierarkio valorigis la laboron, ĝi ŝanĝis la ekonomian funkcion, ĝi ŝanĝis la homajn liberecojn (ne plu servuteco, sed libermerkata laboro dum limigitaj horoj), ĝi ŝanĝis la rilaton al religio kaj apartigis la religion disde la ŝtato. Temis pri egaj sociaj ŝanĝoj, kiuj kondukis al tute alia pozicio de la unuopulo en la socio, al libera tempo por ĉiuj, al malpli grandaj familioj kaj al multaj aliaj novaĵoj.

Kaj nun disvolviĝas informadika teknologio. Oni ankoraŭ ne konscias, ke ĝi kondukas al same granda revolucio en la homara historio, kiel faris la industria teknologio. La sekvoj de tio estas same enormaj kaj por ni apenaŭ imageblaj. Ĉu servutulo aŭ grafo en la 17a jarcento povus entute imagi, ke iam ĉiuj homoj havos egalajn rajtojn, ke ĉiuj devos labori, ke ĉiuj estos alte klerigitaj kaj ke estos demokratio, en kiu pli-malpli ĉiuj povos partopreni en politika vivo?

La neimageblaj ŝanĝoj, kiujn alportos la informadika revolucio, estas nur konjekte senteblaj. Jam nun ekevoluas paralela interreta mondo, en kiu grandparte ne plu validas la leĝoj de la formala mondo. Interreto evoluas sen politika gvidado. La interretan mondon ne kontrolas iu forto aŭ iu armeo, ĝin ne direktas iu potenco, en ĝi jam nun ĉiam pli okazas aferoj sen mono. Sekve en la paralela interreta mondo, kiu ĉiam pli influas ĉies vivon, regos tute aliaj leĝoj, nekonataj en nia ankoraŭ laŭ industriepoka leĝaro funkcianta sociordo.

La interreta mondo montras jenajn tendencojn de la estonta socio:

1. mono perdos sian funkcion – inventojn kaj evoluon konstruos homkreemo en libera tempo;

2. sekve de tio malaperos laborlokoj (homoj laboras sen esti pagataj, ĉar ili havas liberan tempon, en kiu ili povas evoluigi sian kreivecon, kaj tiun tempon ili havas, ĉar varojn por la vivo produktas robotoj);

3. la socion ne gvidos iuj potencaj mastroj (politikistoj, reĝoj) kaj la kunordigado okazos sen superuloj;

4. la sistemon ne defendos iuj armeoj;

5. malaperos diversaj tabuoj (seksaj kaj aliaj – rilato al publika sekspropono plene ŝanĝiĝos);

6. tio sendube kaŭzos ŝanĝojn pri religia vivo kaj vivfilozofioj.

Simple ne estas antaŭvideblaj la konsekvencoj, sed certas, ke la ŝanĝoj estos

radikalaj kaj miaopinie ankaŭ multe pli rapidaj, ol ni imagas. La tuta klopodado de la nuna politiko konservi privilegiojn de unuj, serĉi manierojn malfermi novajn laborlokojn, influu al pli vastaj merkatoj ktp. baldaŭ estos senseca.

La homaro ne plu havos laborlokojn, ĝi ekonomie funkcios sen mono. Regos ne politikistoj, sed posedantoj de informoj kaj scioj. Pli efikaj informinterŝanĝoj inkluzivos pli ekonomian lingvan sistemon – verŝajne tian, en kiu internacie malmultiĝos la lingvoj uzataj kaj sendube la rolo de Esperanto kreskos.

Mi estas scivola pri opinioj de vi, legantoj de MONATO. Eble valorus malfermi interretan forumon por interŝanĝi ideojn. ■



Faktoj kaj famoj

Regis ĥaoso dum du tagoj en aŭgusto ĉe britaj flughavenoj, kiam la registaro anoncis, ke kaptitaj estas 23 homoj – ĉiuj estis britaj islamanoj – kiuj laŭakuze komplotis samtempe eksplodigi ĝis 12 aviadilojn survoje inter Britio kaj Usono.

Laŭ la brita ministro pri internaj aferoj, John Reid [ĝon rid], la teroristoj estis

preskaŭ pretaj lanĉi siajn atakojn, uzante kemiaĵojn en likva aŭ pulvora formo, kiujn ili unuope enaviadiligis kaj dumfluge kunmiksus por krei eksplodaĵon.

Tuj striktiĝis sekureco en la flughavenoj. Pasaĝeroj rajtis kunporti en aviadilon nur platan, travideblan saketon kun monujo, pasporto kaj flugdokumentoj. Ĉio alia, inkluzive de boteloj da akvo, ŝampuo, kontaktolensa fluidaĵo, ankaŭ

dentopasto, devis esti tuj repakita – kune kun komputiloj, fotiloj kaj eĉ libroj – en valizojn destinitajn al la aviadila kargujo.

Preskaŭ ĉiuj flugoj malfruis kaj pluraj estas nuligitaj. Nur kelkajn tagojn poste estis permesate denove enaviadiligi personajn posedaĵojn, tamen nur en rigore kontrolitaj kaj relative malgrandaj tekoj. Restis tamen neakcepteblaj likvoj kaj pulvoroj.



ALEXANDRO MEJIA GREENE

Militistaj intervenoj

Jen la faktoj. Neklara estas la fono – tiom neklara, efektive, ke multaj britoj ekdubis pri la ekzisto de la komploto. Tuj cirkulis famoj, ke la registaro „inventis” la krizon, por montri sin aktiva kontraŭ terorismo kaj por mutigi kreskantan kritikon kontraŭ siaj militistaj intervenoj en Afganio kaj Irako kaj kontraŭ sia silento dum la konflikto inter Israelo kaj Libano.

Britoj amare memoras la 11an de septembro 2001, ne nur pro la atenco kontraŭ la turpario en Novjorko, sed ankaŭ pro samtaga retmesaĝo, en kiu registaraj konsilantoj volis kapti la okazon „enterigi malbonan novaĵon” – alivorte, publikigi malfavorajn statistikojn, esperante, ke neniu ilin atentis. Pro tiu ĉi – kaj similaj incidentoj – la registaro ne estas fidata. Se ministro ion anoncas, la publiko emas male kredi – kaj aparte kaze de la lasta komploto pro manko de specifaj pruvoj.

Kemiaja koktelo

Leviĝas pluraj, ankoraŭ ne kontentige responditaj demandoj. La registaro pretendis, ke ĝi gvasas dum pli ol unu jaro la akuzitojn kaj jam posedas detalojn pri la komploto. Se jes, kial ne simple aresti ilin sen paniki dekmilojn da homoj ĉe flughavenoj? Krome, se ĝi estis informita pri la detaloj, kial ne trankvile anonci, ke pro sekureco ne plu estos permesate enaviadiligi botelojn kaj similajn ujojn? Kaj, pri la komploto mem, pluraj spertuloj opiniis, ke, sen laboratorio, estus preskaŭ neeble kunmiksi en aviadilo la fatalan kemiajan koktelon. Denove: ĉu la registaro troigis por provi regajni la simpation kaj subtenon de cinika publiko?

Alia aspekto. Povas esti, ke pro manko de rekta pruvo (memorindas, ke la 23 akuzitoj estas kaptitaj en siaj hejmoj kaj ne, ekzemple, ĉe flughavenoj kun kemiaĵoj en siaj poŝoj) kolapsos la jurprocesoj (se entute okazos). Ĉiu en Britio rajtas ricevi justan proceson. Argumenteblas, ke komentoj de la interna ministro kaj la polico (ekzemple „Ni ĉesigis komploton celantan murdi amase kaj laŭ skalo neimagebla”), kiu prezentas kiel faktojn ankoraŭ ne jurprocese pruvitajn akuzojn, lezas la rajtojn de homoj leĝe nekulpaj, ĝis tribunalo male verdiktas.

Sirenaj voĉoj

La tiel nomata milito kontraŭ terorismo jam pereigis nenombreblajn viktimojn – kaj ne nur homajn. En Britio, parte pro la registara politiko en Afganio kaj Irako, erodiĝas jaroj da pena laboro por starigi harmoniajn rilatojn inter etnaj kaj religiaj malplimultoj, inkluzive de islamanoj, kaj la indiĝenaj britaj popoloj. La registaro, sola inter estroj de la diversaj enlandaj komunumoj, sociologoj, kleruloj kaj eĉ ordinaraj homoj, rifuzas agnoski ligan inter sia katastrofa eksterlanda politiko kaj, ekzemple, la kreskanta emo inter kelkaj junaj britaj islamanoj aŭskulti la sirenajn voĉojn de ja malmultaj, tamen influaj, fanatikaj pastroj kaj ekmiliti kontraŭ okcidentaj valoroj kaj socioj.

Sed la ĉefa viktimo estas la demokratio – kaj tiusence la tiel nomata milito

kontraŭ terorismo, malgraŭ la naivaj eldiroj de Bush kaj Blair, jam estas afero perdita. Britaj politikistoj, ĉiam celantaj limigi nome de sekureco homajn rajtojn (insistente, ekzemple, ke britoj propra-koste portu identigilojn, kiuj neniel estus helpintaj identigi la jam identigitajn akuzitojn; ke arestitoj estu pli longe enkarcerigitaj, antaŭ ol aperi antaŭ juĝisto; ke registaraj instancoj kolektu kaj retenu ĉiam pli da informoj pri personaj cirkonstancoj, inkluzive de financaj kaj familiaj).

Demokratio, en kiu regantoj kaj regatoj ne plu fidas unu la alian, estas nur laŭnoma, apenaŭ laŭfakta demokratio. Kaj la ĥaosaj scenoj ĉe britaj flughavenoj en aŭgusto nur plifortigas la impreson pri kriziĝanta demokratio.

Paul GUBBINS

ALBANIO

Ĉu akcidento aŭ murdo?

La 16an de julio kraŝis albana registara helikoptero en Adriatikon: la maŝino portis la malsanan eks-ĉefministron Gramoz Pashko al Bari, en Italio. Pereis ankaŭ la filo de Pashko, kuracisto, du pilotoj kaj alia akompananto.

Dum pli ol du semajnoj serĉadis la falintan helikopteron militŝipoj el Albanio, Italio kaj Francio. Fine oni trovis la restaĵojn de la maŝino 40 km for de la marbordo kaj en profundo de 1024 m. Speciala ŝipkompanio el Francio elakvigis la dispecigitan helikopteron, en kiu ne estis kadavroj.

Komence oni suspektis homan eraron aŭ motoran difekton: la helikoptero *Bell 222* estis produktita almenaŭ 30 jarojn antaŭe. Tamen la restaĵoj indikis enaeran eksplodon – kaj du horojn antaŭ la lasta flugo la maŝino transportis la nunan ĉefministron Sali Berisha inter la albana orienta urbeto



Pogradec kaj la ĉefurbo Tirana. Rezulte oni nun konsideras sabotadon pro politikaj celoj kiel eblan kaŭzon de la kraŝo.

Bardhyl SELIMI

MODO

La stilo estas la homo



En Bakongo, kvartalo de Brazavilo tiuj ĉi dandoj sin vestas per luksaj vestaĵoj, eĉ frakoj

En Bakongo, okcidenta kvartalo de Brazavilo, renkonteblas elegante vestitaj junuloj. Tiuj ĉi dandoj, nomataj ankaŭ „parizanoj”, ĉar ili pasigis tempon en la franca ĉefurbo Parizo, sin vestas per luksaj vestaĵoj, eĉ frakoj. Tiel ili volas prezenti sin antaŭ la publiko kiel sukcesuloj, speco de nigrahaŭtaj „blankuloj”.

Cetere multaj el la „parizanoj” sin ŝminkas, denove por esti simbolo de socia sukceso. Ili apartenas al amikaj rondoj, kies membroj rekonas unu la alian pro la fakto, ke ili vizitis la landon de moda prestiĝo, nome Francion.

Do, elegante vestitaj de la piedoj ĝis la kapo, ili renkontiĝas en trinkejoj por sin prezenti al la rigardoj de preterpasantoj. Ĝueblas la senpaga spektaklo, kies observantoj ridete kapklinas aŭ eĉ aplaŭdas. Aparte dum la someraj monatoj videblas la dandoj, kiuj parade paŝas laŭ la stratoj de Bakongo.

Lufoje vestas sin vire junulinoj per tiel nomataj kravato-kostumoj. Tiam okazas dancado – sed nenio anstataŭas la fieran marŝadon kaj parademon de la dandaj „parizanoj”. La franca verkisto Buffon (1707-1788) diris, ke la stilo estas la homo. Sendube li pravis.

Jean-Louis MADZELLA/pg

OPINIO

Pensante pensie ...

La postmilita generacio, nun pensiuliĝanta, estas tre egoisma – tiel opinias Osku Pajamäki, la aŭtoro de *La avida generacio*. Tiu ĉi generacio elspezis la havaĵon de la ŝtato por malpezigi la impostadon de la plej riĉaj popoloj. Ĝi kreis socion, kie tiuj ĵus eklaborintaj pasigu sian tutan vivon kiel servistoj de la pli aĝaj homoj, pagante iliajn pensiojn kaj ankaŭ la ŝtatan ŝuldon amasigitan dum la regotempo de la postmilitnaskitoj.

Nunaj junaj laboruloj povos ĝui nek sekuran dungitecon nek tradician familian vivon. Aldone, la idealo de vivlonga lernado, kiu por iliaj antaŭuloj estis agrabla nova defio kaj ŝanco, garantias al la nova generacio nur disrompitajn karierojn kaj homajn rilatojn. Kvankam la juna generacio pagas pli por pensioj, ili mem ne havos pensiojn egalajn al tiuj de la antaŭuloj, kiuj povas senzorge amuzi sin sur sunaj plaĝoj de sudaj landoj, sciante, ke Finnlando disponigos

al ili bazan sekurecon pagatan de nunaj laboruloj.

Rekompenco

Aliflanke eblas diri, ke plejparte tiuj naskitaj post la milito multe penadis por altigi la vivnivelon de la tuta lando. Al siaj infanoj ili volis doni pli bonan, pacan kaj ne tro penigan estontecon. Tion ĝenerale ja ĉiuj gepatroj ĉie ĉiam alstrebas. Ĉu la rekompenco estas nur akuzoj, amareco kaj la nevolemo dece zorgi pri la kadukuloj kaj maljuniĝintoj?

Konstante aperas en la gazetaro artikoloj pri la bedaŭrinda stato de maljunulejoj kaj pri la nesufiĉa nombro de iliaj vartistoj kaj flegistoj; simile pri pensiuloj, kiuj vivas solaj kaj izolitaj en siaj apartamentoj kaj domoj. Sed antaŭe finnoj kreskis en kuniga ni-animeco gvidate de tradicio luterana. Ili alproprigis al si valorojn, kiaj estas religiemo, solidareco, deco kaj interhelpado.

Postmortajoj

Tiam la edukado estis unueciga, sed hodiaŭaj adoleskantoj sentas sin ne aranoj, sed individuoj. Ilin ne plu intereseas predikoj pri postmortaĵoj: ili pli maltrankvilas pro la stato de la nuna medio kaj la naturo kaj pro la fakto, ke multajn gravaĵojn oni decidis ne en Finnlando, sed ie ekstere.

Ili ne scias, ĉe kies pordo indus proteste manifestacii. De la eklezio ili atendas pli socian mesaĝon, ankaŭ konsideron pri la medio, ne disputojn pri la rajtoj de virinoj pastoriĝi aŭ de sameksemluloj kuniĝi. Pli kaj pli da homoj ekziĝas de la eklezio, opiniante, ke fido kaj savo ne dependas de tradiciaj institucioj – tial ili esploras aliajn kredojn.

Tamen la merkatekonomio ne lasos ilin liberiĝi de siaj katenoj forĝitaj el reklamado, konsumado, dungado kaj timo de senlaboreco.

Raita PYHÄLÄ
Finnlando

Pedale pacen

La norvega organizaĵo *Biciklado por la paco* planas novan kampanjon en 2007, anoncis la iniciatinto Tore Nærland. La sloganoj de la rajdado estas: 1. Ne al atomarmiloj okcidente/oriente, norde/sude; 2. Subtene al la viktimoj en Semipalatinisk, Nevada kaj Ĉernobil; 3. Bicikle por paco kaj malarmado; 4. Bicikle por sano, ĝojo kaj mediprotektado; 5. Sporto por ĉiuj.

La rajdo daŭros de la 1a de majo ĝis la 3a de junio 2007: komence de Novjorko al Vaŝingtono, poste fluge al Bordoza, Francio, kaj tiam al Parizo, Amsterdamo kaj Berlino. Tamen oni ne nur biciklos. Survoje, en ĉiu urbo, kie oni tranoktos, okazos kunvenoj en lernejoj kaj institutoj por handikapitoj, kaj kun pac- kaj sport-organizaĵoj, politikaj aŭtoritatoj, registaroj kaj komunumoj. Okazos ankaŭ kulturaj aranĝoj kun kantado kaj muziko.

La partoprenantoj venos ĉi-foje el Germanio, Norvegio kaj aliaj landoj – la rajdo estas malferma por biciklantoj el la tuta mondo. Oni celas grupon de 20-60 partoprenantoj. Kerngrupo biciklos la tutan vojon. Kunbiciklos lokaj biciklantoj de unu urbo al la sekva.

Amikeco

La unua tia „pacbiciklado” okazis en Nord-Irlando en 1978. Poste *Biciklado por la paco* aranĝis grupbicikladojn en pli ol cent landoj cele al paco, malarmado, solidareco, mediprotektado, amikeco kaj sporto por ĉiuj.

En 1983, jam dum la malvarma milito, realiĝis biciklado (en kiu partoprenis la aŭtoro) Moskvo – Oslo – Novjorko – Vaŝingtono kun kerngrupo el Sovetio, Skandinavio kaj Usono, kaj en 1999 azi-eŭropa rajdo Pekino – Alma Ata – Moskvo – Bergeno, 102-taga.



Tra la jaroj la biciklantoj renkontis plurajn el la mondaj gvidantoj kaj gajnintoj de pacpremioj: papo Johano Paŭlo la 2a, ŝtatestro Andrej Gromiko, ĝeneralaj sekretarioj de UN Boutros Boutros-Ghali kaj Javier Pérez de Cuéllar, prezidantoj Lech Wałęsa kaj Mary Robinson, patrino Teresa kaj Walter Mondale.

Vidu ankaŭ la TTT-ejon www.bike-forpeace.no.

Douglas DRAPER

Fajra afero

Diplomo-ceremonio de la matematika kaj komputika fakultato de la vilnia universitato en Litovio fariĝis fajra afero: diplomito subite, antaŭ 500 homoj, bruligis sian ĵus ricevitan ateston.

El sia poŝo prenis fajrilon 23-jaraĝa studento kaj ekbruligis la dokumenton. Poste li klarigis: „Tio estis mia protesto kontraŭ la kleriga sistemo de Litovio, kontraŭ ĝia nivelo kaj ĝia rigardo al instruado. Mi estas malkontenta pri tia indiferenteco, kiam oni tute ne zorgas pri la kvalito de la laboro.”

La universitato reagis, pridubante la psikan staton de la junulo kaj ties aserton, ke la ŝtata financado de superaj studoj ne sufiĉas.

LAST/pg



Studento bruligas sian diplomon proteste al la klerigado-nivelo en Litovio.



La urbeto Hay-on-Wye plenas de turistoj kaj de libro-vendejoj.

La urbeto Hay-on-Wye [hej-on-ŭaj], situanta ĉe la pitoreska limo inter Kimrio kaj Anglio, unikas en Britio: kun loĝantaro de nur iom pli ol 1800 homoj ĝi tamen posedas 41 libro-vendejojn. Kaj tie, ĉiujare fine de majo kaj komence de junio, okazas dusemajna kultura festivalo, kiu al-tiras eminentajn verkistojn, precipe el la angleparolanta mondo, ankaŭ ĵurnalistojn, klerulojn kaj fojfoje politikistojn.

La dulingva ŝildo en la kimra kaj la angla anoncas, ke Hay-on-Wye estas libro-urbeto – sed ĉe la festivalo apenaŭ sentebblas kulturo kimra.



BRITIO

Angla festivalo – en Kimrio

Ĉi-jare, ekzemple, prelegis ĉe la festivalo – kiu en 2007 celebros sian 20an datrevenon – la iama usona prezidanto-kandidato Al Gore [al gor], kiu pasie atentigis pri la „planeda krizo” rezulte de la tergloba varmiĝo kaŭzata de la homaro. Ovacion starantan (relative malofta fenomeno en Britio) li ricevis, kiam li petis, ke ĉiu fariĝu aktivulo, kiel konsumanto, voĉdonanto kaj civitano.

Tamen dominas la eventon verkistoj – almenaŭ tiuj, kiuj en la pasinta jaro eldonigis novajn librojn, pri kiuj ili prelegas aŭ estas intervjuataj. Jen ebleco dum 50-minutaj sesioj publike esplori la novan verkon kaj eniri la aŭtoro-menson: bonvenaj estas de-

mandoj de la publiko. Inter la verkistoj ĉe la festivalo en 2006 renkonteblis, inter multaj aliaj, Salman Rushdie (fifama pro la *Satanaj versoj*), la romanisto kaj biografo David Lodge, la porinfana aŭtoro Michael Morpurgo, la dramisto Alan Plater kaj la barata romanisto kaj poeto Vikram Seth.



Simple kaj elegante

Aparte impresas la nivelo de la prelegoj kaj intervjuoj. Neniam tro sciencaj aŭ fakaj, ili tamen celas kleran, inteligentan, sed neniel specialistan aŭskultantaron. Ekzemple la lingvisto David Crystal prelegis pensige pri la evoluanta angla lingvo: necesajn fakterminojn li klarigis, simple kaj elegante, kiam li tezumis, ke la plej granda ŝanĝo alfrontata de la angla internacie kaj eĉ nacie uzata devenos ne de ĝia vortotoko sed de ĝia prononcado, aparte de la ritmo de la parolata lingvo.

Interese estas dum la festivalo esplori la 41 libro-vendejojn en Hay-on-Wye. Inter la centmiloj da libroj vendataj rimarkeblas signifa kaj bedaŭrinda fenomeno: bretoj da volumoj pri klasikaĵoj el – precipe – la germana literaturo, elĵetitaj kiel superflujaj el universitataj bibliotekoj britaj kaj ankoraŭ enhavantaj la stampojn de prestiĝaj institucioj, ekzemple kolegioj de la Universitato de Oksfordo. Nenio pli elegante, pli plorinde parolas pri la



Libro-festivaloj prezentas al aŭtoroj bonajn eblojn renkontiĝi kun la publiko. Ĉi tie la lingvisto David Crystal subskribas ekzempleron de sia plejlasta libro.

Post prelego – lego: festivalanoj ripozas helpe de ĵus aĉetitaj libroj



nuna stato de lingvaj kaj literaturaj studoj en Britio.

La festivalo fariĝas ĉiam pli populara, kaj ĉi-jare ĝi pligrandiĝis, tiel ke ĝiaj tendegoj okupis novan kaj pli vastan terenon iom ekster la urbeto – sed piede aŭ aŭtobusete ankoraŭ facile atingeblan. Granda problemo, memevidente, en malgranda komunumo estas gastigi la milojn da festivalanoj, kiuj ŝveligas la loĝantaron. Necesas mendi hotelon aŭ pensionon minimume unu jaron antaŭ la venonta festivalo kaj toleri prezojn iom super la kutimaj.

Tamen strange estas, ke ĉe festivalo, kiu fakte okazas en Kimrio, apenaŭ estas spegulataj la kimraj lingvo kaj kulturo. Aĉetebliis libroj en la kimra, sed malmultaj, malfermis la festivalon kimra kantistino, kaj eblis manĝi ĉe tendo de kimra firmao proponanta kimrajn varojn – krome nenio. La festivalo, sponsorata parenteze de la brita tagĵurnalo *The Guardian*, malgraŭ parenca evento en Hispanio, restas esence angla – sed sendispute spirite stimula kaj riĉiga.

Paul GUBBINS

LITOVIO

Litovio sen eŭro

Evidentiĝis, ke Litovio, male al alia novulo de Eŭropa Unio (EU) Slovenio, ankaŭ en la jaro 2007 restos sen eŭro, al kiu ĝi strebas de longa tempo. Eŭropa Komisiono analizis la situacion kaj konkludis, ke la lando ankoraŭ ne estas preta por funkciigi eŭron en sia teritorio.

Fakte ĝi plenumis ĉiujn mastrihtajn kriteriojn, krom unu: ĝi ne sukcesis regi la inflacion. Laŭ kalkulo de la Komisiono, la averaĝa jara inflacio ĝis marto de 2006 en Litovio estis 2,7 % kaj iomete superis la fundamentan indicon 2,6 %.

La litovaj aŭtoritatoj tamen akiris laŭdojn pro siaj penadoj de la EU-komisionano pri ekonomiaj kaj financaj aferoj Joaquín Almunia. Li kuraĝigis la litovojn pro „bonaj rezultoj de ekonomia agado” kaj esprimis la esperon, ke baldaŭ Litovio plenumos ĉiujn kondiĉojn.

La iama ministro pri financoj Zigmantas Balčytis al tiu konkludo reagis, dirante, ke EU ankoraŭ ne estas preta al vigla disvolvigo de la eŭro-zono. „Kiam tiu ĉi afero estos pritraktita kaj kiam ni interkonsentos pri kondiĉoj kun la Eŭropa Komisiono, tiam ĉio devus solviĝi”, rimarkigis li. Balčytis aldonis, ke ĝis la sekva etapo de la eŭro-zona disvolvigo la litova registaro penos havi klarigon pri la kvanto de anoj, laŭ kies donitaĵoj estas kalkulata la inflacia indico. Ja ĉi-foje oni enkalkulis inflacion de landoj, kiuj ne havas eŭron, ekzemple de Pollando.



Zigmantas Balčytis opinias, ke EU ankoraŭ ne estas preta al vigla disvolvigo de la eŭro-zono.

Valdas Adamkus, la prezidanto de Litovio, instigis la registaron aktive agi por strikta buĝeta politiko, ne akcepti popularajn decidojn kaj vigligi reformojn, celitajn al longdaŭra kresko de la ekonomio kaj popola bonstato, por ke en la estonteco ne aperu duboj pri enkonduko de la eŭro. Li rimarkigis, ke eraroj pri la eŭro devas servi kiel leciono por estonte eviti similajn rezultojn en alia integriĝa flanko – aniĝo al la ŝengena areo¹.

Intertempe la kvanto de malsimpatiantoj de la eŭro en Litovio senĉese kreskas. Dum la lastaj ses monatoj ĝi altiĝis je 3,7 % kaj atingis 41,8 %. Samtempe kreskis kvanto de tiuj, kiuj estas por pli rapida apero de eŭro en Litovio: ĝi pliiĝis je 2,1 % al 30,5 %.

Laimius STRAŽNICKAS



Ekde 2004, kiam Litovio eniris en Eŭropa Unio, pli ol 10% de la loĝantaro elmigris, plimulto da elmigrantoj estas bone edukitaj junuloj.

1. Schengen [ŝengen] estas la nomo de urbo en Luksemburgo. En Junio 1985 kvin landoj de Eŭropa Unio subskribis traktaton, celante forigon de limkontroloj. Pliaj landoj aliĝis al la traktato dum la pasintaj jaroj. La 15 Schengen-landoj estas Aŭstrio, Belgio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Islando, Italio, Luksemburgo, Nederlando, Norvegio, Portugalio kaj Svedio. Ĉiuj tiuj landoj membras en Eŭropa Unio, escepte de Norvegio kaj Islando. (eo.wikipedia.org/wiki/Schengen)

ĈINIO

Ekonomio ege kreskas, sed lando restas malriĉa

En julio 2006 la Monda Banko publikigis la plej freŝan vicordon de la malneta enlanda produkto (MEP) de la diversaj landoj de la mondo. Ĝi montras, ke la MEP de Ĉinio, kun suma kvanto de 2229 miliardoj da usonaj dolaroj (USD), iĝis la kvara plej granda.

La Monda Banko, kies sidejo troviĝas en Vaŝingtono, ĉiujare faras vicordon de la landoj laŭ MEP. En la listo pri la jaro 2005 troviĝas 183 landoj kaj regionoj. Usono restas la unua ekonomia potenco kaj kun MEP de 12 455 miliardoj da USD ege superas Japanion, kiu havas MEP de 4505 miliardoj da USD. Germanio estas tria kaj Ĉinio kvara. Brazilo forpuŝis Baraton de la deka loko.

Kompare kun 2004, kiam Ĉinio estis sepa, ĝi preterpaŝis Italion, Francion kaj Brition. La MEP de Ĉinio estis 2229 miliardoj da USD kaj iomete superis tiun de Britio (2192 miliardoj da USD). La kresko de la ĉina MEP atingis 9,9 %, kompare kun 1,8 % por Britio.

La Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio jam en la komenco de la jaro prognozis, ke Ĉinio iĝos la kvara plej grava lando de la mondo. Nun la Monda Banko per



siaj fidindaj donitaĵoj tion atestis.

Tamen, la ĉinoj meznombre havas MEP de nur po 1740 USD. Laŭ tiu vicordo ili okupas la 128an lokon kaj apenaŭ estis ŝanĝiĝo kompare kun 2004.

Mu Binghua

ALBANIO

Sendrata telefonado regata de monopolistoj

Post la jaro 1991 ankaŭ en Albanio aperis la sendrata telefonado. Antaŭe posedi telefonon estis privilegio de familioj, kiujn la reĝimo opiniis fidindaj. Bedaŭrinde en la lando aktivis nur du telefonkompanioj, kiuj ambaŭ apartenas al la reto de la greka kompanio *Cosmote*. Tial la prezoj por telefonado estas relative altaj. Ĉiuj registaroj pasintaj neglektis tiun monopolan situacion, kvankam en aliaj ekonomiaj kampoj (ekzemple nutraĵkomerco kaj naftokomerco) ili ja intervenis. Tio okazas en lando, kie ankoraŭ iuj regionoj (eĉ urboj) estas senigitaj de fiksa telefonado pro nefunkciado de la tieaj malnovaj telefoncentraloj ŝtataj. Tial la civita-

noj devas nepre uzi la multekostan poŝtelefonon.


La apuda tabelo kun la enlandaj tarifoj en Albanio kaj Luksemburgo ilustras la altegajn albanajn tarifojn. Ankaŭ internaciaj telefonalvokoj kostas en Albanio almenaŭ je 170 % pli, ol

en Luksemburgo. Estas mirinde, ke eĉ en Irako, spite de tiea ĥaoso, interna milito kaj altaj kostoj de manaĝerado kaj asekurado pagendaj de telefonkompanioj, la prezoj estas nur dekono de la albanaj.

Bardhyl SELIMI

| Lando | Loĝantaro | Jara pokapa enspezo (EUR) | Kompanio | Abonantoj | Tarifo (EUR/minuto) |
|-------------|-----------|---------------------------|----------------------------------|-----------|---------------------|
| Luksemburgo | 400 000 | 44 000 | Tango | 200 000 | 0,07 |
| Albanio | 3 400 000 | 3600 | AMC (filio de greka OTE/Cosmote) | 800 000 | 0,35 |

Vortaro ne nur utila sed ankaŭ bela



La *Etimologia Vortaro de la Propraj Nomoj* bele akompanas la *Koncizan Etimologian Vortaron* (2003) de la sama aŭtoro, kun la sama formato kaj simila kovrilo. Ankaŭ la interna aranĝo tute kongruas, tiel ke mi demandas min, ĉu la verkoj estu kombinitaj, se iam necesos fari novan eldonon de ambaŭ. La distingo inter propra nomo kaj normala substantivo ne ĉiam estas klara; estas komunaĵoj (*belgo* estas pritraktita en unu volumo, *Belgio* en la alia); kaj kelkfoje oni volas vidi informojn el ambaŭ libroj

samtempe. Ekzemple, serĉante pri la *Ruĝa Maro*, oni eble volus scii, kial oni nomis ĝin „ruĝa”, kaj ankaŭ la originon de la vorto *ruĝa*: Cherpillod respondas ambaŭ demandojn, sed en apartaj volumoj.

Same kiel la antaŭa verko, la nova vortaro donas relative malmultajn informojn pri Esperanto: ĝi ne diras, kiam vorto unufoje aperis en Esperanto aŭ kial ĝi havas tiun formon kaj ne alian. Aliflanke, ĝi donas tre multajn informojn pri la historio de la vorto ekster Esperanto. Cherpillod ĝenerale spuras ĉiun vorton ĝis ĝia plej praa konata formo kaj donas ankaŭ parencajn vortojn en aliaj lingvoj. Ofte li mencias ankaŭ etimologie neparencajn nomojn por la sama afero.

Kompreneble, tiaj informoj pri la historio de la vorto ekster Esperanto estas troveblaj ankaŭ en nacilingvaj verkoj. Tamen, mi ne havas unu solan nacilingvan libron, kiu donas eĉ duonon de la informoj, kiujn Cherpillod metis en siajn verkojn. Cetere, kvankam unulingvaj nacilingvaj vortaroj ofte donas etimologion, ili ĝenerale neglektas tion ĉe propraj nomoj. Tial la *Etimologia Vortaro de la Propraj Nomoj* estas, verŝajne, eĉ pli utila ol la antaŭa verko.

La vortaro kovras ĉiujn proprajn nomojn, difinitajn en PIV (2002), kaj ankaŭ multajn aliajn, inkluzive de kelkaj vortoj, kiujn PIV uzas en difinoj, sed

forĝesis difini: Aetio, Balbek, Bangaloro kaj aliaj. Iuj el la nomoj pritraktitaj apenaŭ estas establitaj en Esperanto kaj eble estas inventitaj de Cherpillod mem. Pri tio mi ne protestas: ilia inkluzivo ofte ebligas doni la interesan historion de nomo, kiu troviĝas en pluraj naciaj lingvoj. Ekzemple, ĉe *Akse/o* oni povas informiĝi pri la biblia origino de la nacilingva nomo *Axel*.

En sia enkonduko Cherpillod asertas, ke la elekto de etimo estas ofte pli simpla ĉe propra nomo ol ĉe ordinara substantivo. Tamen, ŝajnas al mi, ke relative multaj propraj nomoj havas malcertan originon. Mi kontrolis pri kelkaj tiaj vortoj en la verko. Interesaj ekzemploj, pri kiuj oni ofte polemikas, estas la nomoj de la bibliaj gefratoj Moseo, Aaron kaj Mirjam. Ĉar ĝenerale oni kredas, ke *Maria* devenas de *Mirjam*, la origino de *Mirjam* donas ankaŭ la originon de la nomo de la plej grava virino en la kristanismo. Tial iuj volas trovi specialan signifon en la nomo *Maria*, kaj pluraj hebreaj etimoj estas proponitaj. Tamen, laŭ iuj, ĉiuj tri nomoj devenas de la egipta. Cherpillod donas egiptan originon por *Moseo*, sugestas eblan egiptan devenon ĉe *Aarono*, kaj ĉe *Mirjam* estas nur „necerta deveno”. Cetere, laŭ Cherpillod, la nomo *Maria*, verŝajne, ne devenas de *Mirjam*.

Mi trovis ankaŭ aliajn malkongruojn inter Cherpillod kaj aliaj fontoj. Por mi, unu el la plej frapaj ekzemploj estas *Izabela*, kiu, laŭ Cherpillod, eble evoluis de „Belenos (galla suna dio)”. Mi esperas, ke li pravas, ĉar mia filino nomiĝas tiel, kaj mi ĝojus, se ŝia nomo havus interesan originon. Tamen, laŭ ĉiuj aliaj fontoj, kiujn mi konsultis, *Isabel* estas nur hispana aŭ portugala formo de *Elizabeto*. Alia ekzemplo estas *Antono*, kiun Cherpillod devenigas eble el la greka. Aliaj fontoj diras, ke oni ŝanĝis la formon de la nomo, aldonante H post la T en iuj nacilingvaj formoj por ŝajnigi ĝin greka, dum ĝia vera origino estas alia.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tif. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.

Mi trovis en la vortaro multegajn aferojn, kiuj interesis min, kaj nur unu aferon, kiu ĝenis min: la aserto ĉe *Armenio* kaj pluraj aliaj nomoj, ke „oni esperantigis ne la armenan formon, sed ja la internacian, kiel en ĉiuj similaj kazoj”, estas plumpa trosimpligo kaj malinda por tiel klera libro. Cherpillod povus doni pli nuancitan priskribon de la situacio, menciante ekzemplojn kiel *kartvelo* kaj *kimro* kaj notante la tendencon anstataŭigi *la-pono* per *sameo* ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en multaj aliaj lingvoj. Tamen pli bone estus simple forstrecki tiujn frazojn: ĉar la vortaro ĝenerale ne pritraktas la Esperantan parton de etimologio, diskutoj pri landonomoj en Esperanto estas ne nur tedaj por la leganto, sed ankaŭ eksteremaj por la verko.

Ĉe la pozitiva flanko mi menci, ke la libro estas ne nur interesa kaj utila, sed ankaŭ, laŭ mi, tre bela. Ĉar Cherpillod donas vortojn en la araba, ĉina, greka, rusa kaj multaj aliaj lingvoj, eĉ ankaŭ la egipta, en iliaj propraj skriboj (ankaŭ kun transskribo, krom ĉe vortoj, skribitaj cirile kaj greke), mi speciale gratulas pro tio, ke li sukcesis miksi la diversajn skribojn sen fari tipografian ĥaoson: la informoj estas facile troveblaj kaj legeblaj, kaj la ĝenerala aspekto de la paĝoj estas plaĉa.

Konklude, mi pensas, ke granda parto de la kleraj esperantistoj volos havi ambaŭ etimologiajn vortarojn de Cherpillod sur facile alirebla librobreto apud PIV kaj simile gravaj verkoj.

Fine mi volas aldoni rimarketon, kiu ne koncernas la nunan verkon, sed ja etimologion ĝenerale: estus bele, se etimologia vortaro pritraktus ankaŭ kunmetaĵojn, tiel ke oni povus informiĝi pri la deveno de vortoj kiel *elteni*, *necesejo* kaj *ludostoj*.

Edmund GRIMLEY EVANS

André Cherpillod: *Etimologia vortaro de la propraj nomoj*. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 2005. 227 paĝoj broŝuritaĵ. ISBN 92-9017-089-1.

Prezo ĉe FEL: 15 EUR + afranko.

Literatura litanio

„Laborante en iuspecaj espero-vendejoj, ili ne rajtas partopreni en la reprodukta procezo de la specio. Mi demandas min, ĉu la supera ĉiopova kreanto kreis ilin sen reproduktorganoj.”

Acida aludo al la fraŭleco de la katolikaj pastroj, tiuj linioj, aprenitaj el la rakonto donanta nomon al la libro, iom resumas la etoson de la kvin rakontoj tra la dudek ok paĝoj de la kolekto. La kugloj elpafitaj de la aŭtoro, Thierry Salomon, juna franco loĝanta en Hungario, ne limiĝas al la religia sfero, sed iras plurdirekten: stultiĝo antaŭ televidekranoj, fremdiĝo ĉe poŝtelefonoj, malsimetrio inter riĉuloj kaj malriĉuloj konsistigas kelkajn el la objektoj de lia furiozo. Ĉio tio, pentrita per ordinara lingvaĵo kaj konstruita laŭ sensurpriza skemo, lasas ĉe la leganto nuran guston de kvazaŭjurnalisma teksto. Sen multaj lingvaj eraroj, la rakontoj tamen estus iom pli plaĉe legeblaj.

Kiel oftas ĉe verkistoj de nia tro memiĝinta kaj lingvema komunumo, la eterna demando pri lingvoproblemoj (ho ve!) ankaŭ ĉi tie estas pritrakita, sed sen laŭa literatura ellaboro. La temo aperas en la rakonto *Mondolingvo*, en kiu laŭ inversigo de historia fakto, la nazia Germanio, venkinta en la dua mondmilito, trudas sian lingvon al la mondo. La konsekvencoj, facile antaŭvidotaj danke al la usona modelo, kiun la rakonto alegorie reproduktas, estas pritraktitaj sur ĉiu linio. Jen la rakontanto priploras la malekvilibron de laborŝancoj inter denaskaj germanparolantoj kaj ceteraj civitanoj, jen ĝi komentas la rezulton de malbona rego de la germana („engleutsch” kaj „frallemand”) eksterlande. Rezulto: oni ricevas la impreson legi ne rakonton, sed unu el tiuj eŭropecaj Esperanto-propagandiloj, farĉitaj je la kutima lingvo-problema litanio.



La inspiro por kelkaj rakontoj ŝajnas veni el la soci-politika fikcio de la hungaro Sándor Szathmári (1897-1974), sen, tamen, ties brilo. Aliaj, kiel *Reveno al Esperantolando*, estas nura babilajo, en kiu la rakontanto, *alter ego* de la aŭtoro, bedaŭras la koruptitecon de tro neologismplena Esperanto. La tuto impresas kiel rezulto de adoleska verovo, tiel ke literaturamanto ne fieros surbretigi la rakont-kolekton apud niajn plej bonajn prozistojn. Des pli se, krom literaturamanto, li/ŝi estas bibliofilo.

Reinaldo Marcelo FERREIRA

Thierry Salomon: *La planedo de la senfelaj simioj kaj aliaj rakontoj*. Eld. Abonasoft, Budapeŝto, 2005. 28 paĝoj vinktitaj. ISBN 963 218 213 8.

Prezo ĉe FEL: 2,40 eŭroj + afranko

Arto „videbla” ankaŭ por blinduloj



Nike el Samotraco

De 1993 ekzistas en Ankono, Italio, muzeo iom eksterskema, la muzeo *Omero* (nomata laŭ la itala formo de Homero, kiu, laŭ tradicia scio, estis blinda). Vi eniras en unu el la grandaj salonoj, kaj vi trovas ... jes! Jen *Nike el Samotraco*! Sed ĉu ĝi ne troviĝas en *Louvre*? Kaj pli proksime rigardas nin kun sia sinteno impona kaj iom scimontra Aulus Metellus aŭ *La Etruska Alparolisto*. Ni turnu nin maldekstren, kaj en bela salonego salutas nin la plej elstaraj ĉefverkoj de antikva arto: ĉi tie *Diskoĵetanto*, tie la fortikaj muskoloj de *Luktantoj* kaj ĉe alia flanko la sens-instiga ekrido de *Melosa Venuso*.

Ni ŝanĝu salonon kaj la renesancaj brilajoj renkontas nin: Donatello, Michelangelo, Bernini ...

En tiu muzeo, sur belaj lignaj piedestaloj, ni trovas kunmetita centon el la plej elstaraj ĉefverkoj, kiujn la homa menso kapablis elpensi kaj la mano de eminentaj skulptistoj skulptis el marmoro aŭ forĝis el bronzo, de la egipta civilizacio ĝis la novklasika stilo en la dek-naŭa jarcento. Kompreneble temas ne pri originaloj, sed pri perfektaj muldkopioj gipsaj aŭ vitrorezinaj, preskaŭ ĉiuj reproduktitaj laŭ la originalaj dimensioj. Sed ne gravas! La rigardantoj povas aprezi kaj admiri ĉiujn nuancojn, kiujn la sentsugestado de tiuj mirigaj formoj kapablas vivigi. Cetero, se vi pluiros la longan koridoron, inter grandaj statuoj kaj belaj arkeologiaj aĵoj, vi estos ĉirkaŭita de aro da nuntempaj skulptaĵoj, ĉiuj originalaj, tiaj, kiaj eliris el la manoj de pluraj eminentaj artistoj, el ŝtono, ligno, bronzo, terakoto ktp.

Pri la didaktika valoro de tiu muzeo rapide ekkonsciis la ankonaj lernejoj, kiuj multnombre tien kondukas siajn klasojn. Nu, kial admiri la ĉefverkojn de plastikaj artoj nur el la fotoj, se ĉi tie oni povas ilin vidi deproksime kaj ... eĉ tuŝi?

Jes, eĉ tuŝi; jen la afero! Tiuj skulptaĵoj, kiujn tie ĉiuj rajtas rigardi, estis faritaj ĉefe por ke ilin *tuŝu* speciala publiko: la nevidantoj.

Eble laiko povus spontane ekde- mandu iom naive: „Ĉu blindulo kapablas kompreni arton?”

Iru al la muzeo *Omero* ĝuste tiam, kiam tie estas iu, kiu per siaj manoj sentemaj ektuŝas delikate, preskaŭ karese, la vizaĝon de *Mortanta Galato* aŭ la minacmienon de mikelanĝela *David*, kaj vi tuj ricevos la respondon: lia atentemo, skrupulesplora pri tiuj

Arkeologia sekcio



formoj, lia haltado sur la detaloj, lia mi-eno mirigita kaj preskaŭ ravita diras al vi tre klare, ke li komprenas tion, kion li „rigardas” permane. Kaj vi eble povas ankaŭ pripensi jenon: tiujn famajn ĉefverkojn, kiujn ĉiuj konas, vidinte multfoje sur fotoj, li eble admiras unu-afoje, ĉar por blindulo ne estas facile tuŝi ilin: ne eblas viziti ĉiujn muzeojn kaj lokojn tra la mondo, kaj, ĉiuokaze, kiamaniere atingi iujn altojn? Kiel eskapi el multaj aŭŝoj kun la kutima skribaĵo: „Ne tuŝu”? Kiel trapenetri per manoj vitrajn barilojn?

Sed en la muzeo *Omero* tiaj problemoj tute ne ekzistas: statuoj estas tie, sur siaj belaj piedestaloj, kaj estas ankaŭ moveblaj ŝtuparetoj, kiuj ebligas al blindaj vizitantoj (kaj, kial ne?, ankaŭ al vidantaj infanoj) supreniri por esplori la plej altajn partojn; kaj estas brajlskribaĵoj, por ke ili sciu, pri kio temas.

Sed ne sufiĉas statuoj. Sur alia etaĝo tronas grandaj maketoj de kelkaj belegaj monumentoj: la baziliko de Sankta Petro en Romo, la katedralo de Ankono kaj de Florenco, Panteono en Romo, Partenono ktp kun ĉiuj detaloj perfekte faritaj laŭskale. Post kel-

kaj monatoj aldoniĝos elstara ekzemplo de la gotika stilo: la katedralo de Chartres.

Tiu ideo naskiĝis antaŭ pli ol dudek jaroj en la kapoj mia kaj de mia edzino post longa migrado tra la mondo kaj penado trovi la ĝojon ĝui la belecon de artoj kun oftaj seniluziigoj pro la oftaj malpermesoj, plejokaze nenecesaj. Mi laboradis kelkajn jarojn por tiu projekto, kaj finfine la muzeo fariĝis realaĵo la 29an de majo 1993. Tiu bela kaj simpla realaĵo estas unika en Italio, kaj ĝi nun havas nur unu similspecan ekzemplon en Madrido.

En 1999 la Itala Parlamento unanime akceptis leĝon, per kiu la kreaĵo ricevis la titolon Ŝtata Palpsensa Muzeo *Omero*.

Ĝi naskiĝis por blinduloj, sed ĝia sperto malkovrigas al la nuna „bildso-cio”, ke nia „virtuala” mondo ne estas aŭtentika; naturo donis al homoj kvin alirojn al la realo, kaj konkreta kono bezonas ĉiujn kvin sensojn. Muzeo *Omero* redonas dignon al unu „perdita” scikanalo: palpsenso. La muzeo jam estas tre atentema ankaŭ pri la plursensa dimensio de la mondo kaj ankaŭ de arto. Multaj studentoj venas

al ni por fari staĝojn, multaj por prilabori siajn doktorigajn disertaciojn.

Muzeo *Omero* naskiĝis por blinduloj; nun ĝi estas senbarila muzeo por ĉiuj. Denove praviĝas la aserto, ke, se oni pensas pri handikapuloj, la socio fariĝas pli bela kaj pli komforta por ĉiuj!

La esperantlingva retejo ĉe www.museoomero.it/museoomero/Esperanto/index.asp nun estas konstruata.

Aldo GRASSINI



La fino de malmultekosta energio



LIN BOW

Estonta evoluo de naftoprezoj

La nunan plialtiĝadon de naftoprezoj parte klarigas nunaj politikaj kaj naturaj malfacilaĵoj, nome la milito en Irako, politika malkvieto en Venezuelo, kaj laste la uragano, kiu ruinigis la sudajn ŝtatojn de Usono. Sed ankaŭ strukturaj cirkonstancoj, pli kaj pli fortiĝontaj, klarigas la situacion, nome la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio, Barato kaj Brazilo, kaj la daŭra alta nivelo de konsumado en evoluintaj landoj. Krome, oni ne plu malkovris gravajn naftorezervojn de trideko da jaroj kaj la nunaj eltrovoj ne kompensas la kreskon de la tutmonda postulado.

Kvankam tio estas varme disputata afero, pli kaj pli da fakuloj, registaroj kaj eĉ petrolfirmaoj publike agnos-

La daŭra kreskado de naftoprezoj konsciigas homojn, aparte okcidentanojn, ke tiu ĉi krudmaterialo estas altvalora kaj samtempe rara krudmaterialo. Ĉu jen la fino de la ekonomio bazita sur nafto?

kas, ke nun venas tempo de daŭre multtekosta nafto. Jam junio 2004, raporto de la franca registaro en unuaj asertoj asertis la neeviteblon de evoluita. Post *Shell* [ŝel] en 2004, la firmo *Texaco* [teksako] atentigis en septembro 2005 pri daŭre altaj naftoprezoj, ĉar la postulado jam kreskas pli rapide ol la proponado. Certe ne estas hazardo, ke la usona registaro nun regas tri kvaronojn de la mondaj naftorezervoj, ĉu per alianco, ĉu perforte, tra la milito en Irako, ĉeesto de soldatoj en meza Azio, konstruado de naftodukto de Azerbajĝano al Turkio, politikaj premoj al Venezuelo kaj Irano ktp. Ĉu aliaj energifontoj kapablos provizi nin per abunda kaj malmultekosta energio?

Vegetala brulaĵo aŭ nutraĵo?

Espero nun kuŝas en alternativaj energifontoj, ĉefe renovigeblaj. Certe, oni povus ekspluatadi bitumajn sablojn (ĉefe en Kanado), sed la eltirado de tia nafto estas tre energikosta, ĉar ĝi konsumas grandegajn kvantojn da gaso.

Esperoplena solvo estas la tiel nomata vegetala brulaĵo el kultivaj plantoj, aparte oleonapo (sed ĉiaj plantoj taŭgas, eĉ planta rubaĵo kaj uzita fritoleo). Francio, iama elstara produktanto de vegetalaj brulaĵoj, intencas relanĉi larĝskalan produktadon. Sed estis jam kalkulite, ke la anstataŭigo de klasika benzino per vegetala benzino en Francio uzus almenaŭ du trionojn de la landa agrikultura tereno! Laŭ Eŭropa Komisiono ĉirkaŭ 10-15 % de la agrikulturaj terenoj en Eŭropo povus esti dediĉitaj al oleonapo, provizante ĉirkaŭ 20 % de la brulaĵo konsumata de la trafiko eŭropa. Limigo al la oleonapa kultivado estas la neceso nutri homojn, inkluzive veturantojn.

Ĉu nuklea energio estus solvo? Denove, la nombro de nukleaj centraloj necesaj estus tiel alta, ke la konataj rezervoj de uranio estus konsumitaj post 20-30 jaroj, eĉ se oni ne atentus la mankon de akvo por malvarmigi la reaktorojn kaj la traktadon de tiom alta kvanto de radioaktiva rubaĵo. Same, venta kaj suna energioj havas sian limigon kaj ne anstataŭos nafton.

Ĉu hidrogena estonteco?

Mirakla energi-fonto ŝajne estas hidrogeno. Hidrogeno estas brulaĵo tiel taŭga kaj efika kiel nafto, kaj la tiel nomata „hidrogena ekonomio” estas ja aktuale plej laŭmoda. La usona prezidanto Bush [buŝ] jam esprimis sian intereson pri tia ekonomio. Sed hidrogeno ne estas energifonto, nur energistikilo: senmiksitan hidrogenon oni tiras el akvo per energikosta procezo. Krome, tiucele oni bezonas puregan

La jaron 2002, la naftoŝipo Prestige kaŭzis grandegan ekologian katastrofon en la marbordo de Galegio.



MANUEL CALAVERA



Nuklea centralo Civaux

akvon, kies produktado ankaŭ postulas grandan kvanton da energio. La necesa energifonto estus aŭ elektro (nuklea, akva, suna, venta), aŭ nafto. Se ĉiuj usonaj veturiloj funkcius per hidrogeno, la usona konsumado de akvo plialtiĝus je 10 % en lando kie tia konsumado jam estas altega. Hidrogeno verŝajne longe restos multekosta brulaĵo, ne ofte uzata pro limigo de bazaj energifontoj.

Finfine restas pliefikigo de la energiuizado. Tio estas ja grava „fonto de energio”, ĝuste dirite de „neenergio”. La nunaj teknikoj jam helpas atingi gravajn rezultojn kaj eblus kvaronigi la mondan konsumadon de energio. Tiel nomataj hibridaj veturiloj, havantaj benzinan kaj elektran motorojn, jam ŝparas trionon de la necesa benzino. Pliperfektigitaj solvoj ebligas fabriki aŭtojn, kiuj konsumadas nur 1 ĝis 2 litrojn da benzino en 100 km, sed ilia kosto estas altega.

Ŝanĝigonta vivstilo

Neniu energio povos sola anstataŭi nafton. Verŝajne la solvo estos mikso de tiuj ĉi energifontoj kaj energiŝparoj. Al la homaro ne tuj mankos energio, sed certas, ke la epoko de malmultekosta energio baldaŭ finiĝos. Transportado de varoj tra la mondo kaj senĉesa veturado iom post iom malkreskados. Tio evidentiĝas, ke la malŝparema vivstilo kiel la nuna okcidenta pro-

funde ŝanĝiĝos kaj ŝanĝendos dum la venontaj jardekoj. Tio povus signali la komencon de monda ekonomia katastrofo, sed ankaŭ povas esti okazo raciigi kaj rehomigi nian ekonomian sistemon.

Pierre BERTRAND



Fuelpila aŭtobuso en Londono: Fuelpilo aŭ brulaĵopilo estas elektrokemia pilo, kiu transformas la reakcian energion de la daŭre alkondukata brulaĵo kaj oksigeno al uzebla elektra energio. Ĉu ĝi estos la solvo, aŭ ĉu ni draste limigu transportadon entute?



Ĉu militoj savos Usonon?



La usona ekonomio

Privataj kaj ŝtataj ŝuldoj formas trioblon de la usona malneta jara enspezo. Ili ne plu estas sub regado de la registaro. Dum la lastaj kvin jaroj la importado plialtiĝis je 38,4 %, sed la eksporto nur je 9,7 %. La kresko de la ekonomio estas financata per kreditoj kaj eksterlandaj investoj. Nur malgranda parto dependas de la kresko de la industria produktado. La produktkapablo de industriaj entreprenoj estas eluzita nur je proksimume 77 % kaj la prezo de laborfortoj estas alta.

La defcito de la komerca bilanco kaj de la ŝtata buĝeto rapide kreskas. Plialtiĝas la ŝuldiĝo pro ŝtataj elspezoj. La defciton finansas la resto de la mondo per aĉetado de ŝtataj obligacioj. Ekde la jaro 2001 Popola Respubliko Ĉinio aĉetis 43 % de la usonaj ŝtataj obligacioj por bremsi la falon de la valoro de la usona dolaro kaj tiel eviti damaĝon al sia eksporto al Usono kaj

al aliaj regionoj, kie la dolaro estas la ĉefa valuto.

Riska komercado

Superaveraĝaj profitoj de internaciaj kompanioj kun ĉefe usona kapitalo estas atingataj per transigo de produktado kaj esplorado en Ĉinion, Baraton kaj sud-orientan Azion. Tio malhelpas la internan evoluon en Usono. Kreskas la senlaboreco kaj ekestas streĉoj en la sociala sfero.

Malgraŭ ĉi tiuj problemoj Usono restas akceptanto de gravaj eksterlandaj investoj. Sed ankaŭ en ĉi tiu sfero okazas konstanta malkresko kaj la investoj ne iras rekte en la industrion sed en investajn fondusojn. Ili estas senĉese pli riskaj. Konfirmas tion la strebado de la centraj bankoj de Japanio kaj Ĉinio. Ĝis antaŭ nelonge ili konstante aĉetis usonajn ŝtatajn obligaciojn por limigi la malaltiĝon de la valoro de la dolaro. Nun ili ne nur

malpliigas siajn investojn en la usonan ekonomion sed pripensas kreon de komuna merkato de aziaj obligacioj kiel alternativon al usonaj. Ambaŭ bankoj strebas ŝanĝi la proporcion de valutaj rezervoj profite al eŭro.

Milita komercado

En la usona ekonomio de la lastaj 65 jaroj rimarkindas unu konstanto: la forta kunligo inter militaj invadoj kaj kresko de la landa ekonomio. Laŭ donitaĵoj de la ŝtata oficejo pri ekonomiaj esploroj, kreskoj de la ekonomio okazis dum preparado de militoj, dum militoj kaj dum la postmilita konstruo. La usona gazeto *Wall Street Journal* skribis en februaro 2003, ke dum la preparo de la atako de Irako la militaj elspezoj reprezentis la unusolan favoran flankon de la „malforta usona ekonomio”.

Kiaj estas la preferataj militaj elspezoj?

—ili plifortigas kelkajn gravajn sektorojn de la usona ekonomio: la aviadajn, komputilajn kaj elektronikajn kompleksojn, kiuj arigas 85 000 kompaniojn kun milionoj da dungitoj

—ne nur armilaj entreprenoj sed ankaŭ esploraj kaj disvolvaj teknologioj estas financataj per ŝtataj rimedoj —eksporto de armiloj kaj milita tekniko estas unu el la plej gravaj eksporteroj de Usono (47 % de la monda komerco de armiloj).

Ekde la unua interkonsento pri internacia komerco en la jaro 1947 (la t.n. Ĝenerala Konvencio pri Dogano kaj Komerco, konata per la angla mallongigo GATT) la usona milita industrio ĝuas escepton pravigitan per „ŝtata sekureco”. Tio ebligas al Usono havi protektadan kaj subvencian politikon rilate al eksporto de armiloj kaj de milita tekniko. La profitoj de armistoj tiel multe plialtiĝis en la lasta periodo.



En Vjetnamio

Raba konstruo

Post la profitoj el la detruo de Irako sekvas profitoj el la konstruo. En la konstruo de Irako partoprenas ĉefe usonaj kompanioj kiel *Bechtel Group*, *Fluor Corporation*, *Louis Berger Group*, *Parsons Corporation*, *Halliburton*. *Halliburton* (ĝis la jaro 2000 vicprezidanto Dick Cheney estis prezidanto de ĝia administra konsilantaro) akiris pere de frata kompanio *Kellog Brown and Root* kontrakton kun valoro de 200 milionoj da dolaroj por konstruo de la dumilite detruitaj nafto-ekspluatataj instalaĵoj.

Kiu pagas? Jam antaŭ la invado de Irako tiama oficiala parolisto de prezidanto Bush diris, ke la efektiva problemo de la estonteco estas pagoj por konstruo de Irako. Irako, diference de Afganio, estas riĉa lando. Tie estas senlimaj fontoj de krudaĵoj, kiuj apartenas al la iraka popolo. Estas multaj manieroj kiel akiri repagon aŭ kompenson por la konstruo.

En Irako



Juran bazon por prirabo de la malvenkinta Irako kreis la unua usona guberniestro Paul Bremer. Li organizis la privatigadon de irakaj ŝtataj propretoj: produktado de elektra energio, telekomunikado, infrastrukturo de ekspluatado kaj transporto de nafto kaj gaso ktp. Estis ekskluzivita ia ajn posta regado kaj interveno de la iraka registaro kaj la ŝtataj organoj. Eksterlandaj kompanioj akiris plenan liberon. Ili rajtas posedi kaj plene kontroli ĝis 100 % de la akcioj. Ankaŭ 100 % de la profitoj povas iri eksterlanden. Kompanioj pagas nur 15 % de imposto (antaŭ la milito 45 %). Ses elektitaj bankoj ricevis licencon kaj tiel priregas la irakan bankan sektoron. Jozefo Saba, tiama regiona direktoro de la Monda Banko, pritaksis la leĝigitan rabon jene: „Ĉi tiu paŝo ebligis krei taŭgan medion por alfluo de eksterlandaj investoj.”

Temis pri kontrolo de nafto

Paul Wolfowitz, la tiama vicministro pri defendo de Usono kaj ekde junio 2005 prezidanto de la Monda Banko, diris: „La kaŭzo kial ni ekmilite kontraŭ Irako kaj ne kontraŭ Norda Koreio estas, ke Irako naĝas sur maro da nafto.” Ĉu la usonaj kompanioj havos utilon el naftaj fontoj nur post stabiligo de politika situacio en Irako? Ili profitas jam ▶



Sadam Husajn post sia kaptiĝo.

SGT MICHAEL A. BLAHA

Usonaj soldatoj en Irako

► nun. Pro la alten pelita prezo de nafto la tri plej grandaj usonaj kompanioj krome enspezis 10 ĝis 30 miliardojn da dolaroj. Naftaj kompanioj havas pli grandan intereson teni la prezon de la nafto alta ol la proprietuloj.

El akiro de regado super la iraka nafto Usono havas du avantaĝojn: limigon de la pozicio de Saŭda Arabio kaj OPEL (Organizaĵo de Petrol-Eksportaj

Landoj) kaj malpligraviĝon de la rusaj fontoj. Tiuj estas konsiderataj kiel alternativoj en la okazo de provoj pri revoluciaj ŝanĝoj en ŝtatoj de Persa Golfo. En la unua kazo, kiam la ekspluato de iraka nafto estos plene modernigita, tio fariĝos katastrofo por Saŭda Arabio kaj OPEL, kiuj jam nun precize plenumas la instrukciojn de Usono. En la dua kazo, Rusio, kiu post la 11a de sep-

tembro 2001 sukcese klopodis fariĝi la dua plej granda produktanto de nafto, povus esti elpremita el la ludo, ĉar en Irako la kostoj de ekspluato kaj transporto estas multe pli malaltaj ol en Rusio.

Timo pro eŭro

Eŭropo dependas de la nafto el Persa Golfo. Nur parto de la eŭropa naftobezono estas kovrita per liveroj el Britio, Norvegio kaj Rusio. En la jaro 2000 Sadam Husajn decidis, ke naftokomerco okazos per eŭroj. Tion Usono devis puni, ĉar alie la usona dolaro perdus sian rolon kiel ĉefa monda valuto, kaj ĝi estus senigita de sia influo por decidi pri mondaj prezoj de nafto. Se oni komercas kun nafto nur en dolaroj, la ŝtatoj sen dolaraj rezervoj devas vendi siajn varojn kontraŭ dolaroj por povi aĉeti nafton dolare.

Kia estis la celo de invado en Irakon? Usono volis teni la pagojn por nafto nur en dolaroj kaj tiel savi la usonan ekonomion. Krom tio ĝi donis signalon al ĉiuj produktantoj de nafto, kio povus sekvi, se ili provus fari ion similan kiel Husajn.

Provizore la ekonomio de Usono ŝajnas esti plifortigita per la militado. Sed la usonaj ekonomiaj problemoj ne estas solvitaj. La milito subtenis ekonomian disvolvon sed ne sukcesis kompensi la ĝisnunajn perdojn. La defcito de la eksterlanda komerco plu plialtiĝas same kiel la defcito de ŝtataj elspezoj. Ĉu oni solvos tion per plia milito?

Josef MENDL

Hiroŝimo post la nuklea bombatako



ANONCETOJ

...**jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj personoj 25-55-jaraĝaj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko? Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe www.retbutiko.net.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Facilaj donacoj por viaj korespond-amikoj: la donacokuponoj de FEL. Ekzistas librokuponoj en kiu ajn sumo, kiun oni povas interŝanĝi en la Retbutiko de FEL (www.retbutiko.net), kaj donacokuponoj por trimonata, sesmonata aŭ jara abono al Monato. Por mendoj aŭ informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarketo
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

finfine reaperis...

4a adaptita eldono

Grammaire

ABC

d'espéranto

Christiane De Vleminck et
Émile Van Damme

krozu nun al
www.retbutiko.net
kaj mendu hodiaŭ!